# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 8 Aŭgusto, 2015

*Kara Leganto, mi tutkore petas pardonon pro la malfrua apero de ĉi numero, kiu fakte devus ekvidi la mondon antaŭ unu monato. Estas du gravaj novaĵoj: unua – tutmonda, alia – loka, kiujn oni devas enigi en ĉi numeron. Do, oni komencu de la globa: en Lillo (Francio) sukcese fermiĝis la 100-a Jubilea Universala Kongreso de Esperanto. Laŭ definitiva statistiko, al ĝi aliĝis 2698 kongresanoj el 80 landoj. Sekve ĝi fariĝis la plej granda UK de post tiu en Berlino en 1999, kiu altiris 2712 aliĝintojn. En la historia statistiko de ĉiuj UK-oj, Lillo atingis la 14-an lokon, tuj post Berlino. La nombro de landoj (80) estas rekorda. Kvarono de la aliĝintoj, sume 724, venis el la kongreslando Francio. Kun 200 aliĝintoj la duan lokon okupis Germanio. Pli ol 100 aliĝojn liveris ankaŭ Japanio (171), Brazilo (124) kaj Pollando (115).*

*Lokaĵo: antaŭ nelonge mi eksciis, ke 6-jara Davido-Armano nun ne estas la plej juna membro de nia E-societo…*

–La Redaktoro

## Sukcesega UK en Lillo - I *de Araneo (V. Pajuk)*



Oni povas kompreni de la titolon, ke la lasta UK en Lillo ege sukcesis, delonge la monda E-komunumo ne havis tiun, oni povas diri, pompan Kongreson: multas koncertoj, lekcioj dum Internacia Kongresa Universitato, teatraĵoj, kunsidoj pri E-movadaj temoj, fakaj renkontoj: etuloj, blinduloj, matematikistoj, juristoj, kat-ŝatantoj, E-instruistoj ktp. Kvin membroj de la ESdŜ partoprenis ĝin! Mi persone komencis la vojaĝon al la Kongreso de mia amata Ukrainio, kie mi vizitis gepatrojn kaj lokajn E-stojn. La sekvanta haltejo de mia vojo estis Germanio, la lando, kie mia fratino Lena, kune kun vic-prezidanto de la Germana E-Asocio edukas du gefilojn, unu el kiu interesiĝas pri IL. En plene E-etoso, dum kelkaj horoj sabate, la 25an de Julio, ni atingis Lillon por registrado.

Ne forgesu, ke la nuna UK okazis ĝuste 110 jaroj post la Unua en Bulonjo-ĉe-maro, kiun partoprenis nia Majstro mem. Do, dekomence – kelkajn paragrafojn de l' historio.

La 13an de Julio 1906, Benoît Damien, la dekano de la scienca fakultato ĉe Lilla Universitato, skribis al la prezidanto de la Lilla Ĉambro de Komerco, Edmond Faucheur. Damien estis membro de la Esperanto Industria kaj Komerca Societo de Francio, kaj verŝajne vizitis la unuan Universalan Kongreson de Esperanto en Boulogne-sur-Mer la jaron antaŭe. Lokaj verkistoj kaj politikistoj priskribis Lillon kiel 'vojkruciĝa' urbo inter Germanio, Francio, Belgio kaj Anglio ekde almenaŭ la 1870-aj jaroj. Antaŭvidante komercan estontecon, la urba komunumo proponis klasojn de la germana kaj la angla en siaj lernejoj. Damien estis konvinkita, ke Lillo devas adopti Esperanton.

Kion pli oni povus deziri por intelektuloj, industriistoj kaj komercistoj, ol vidi la liberan cirkuladon de ideoj, produktoj kaj komercaĵoj sur la merkato kiu, estante eŭropano, fariĝis tutmonda? Li skribis: "Do, pli ol ajna alia, la urbo de Lillo, ĉefurbo de industria regiono, malfermita al ĉiuj ideoj de progreso, devas montri ke ĝi ne estas neŭtrala en la demando de internaciaj rilatoj kaj en ilia pliboniĝo de Esperanto." Li volis, ke la Ĉambro de Komerco subvenciu klasojn en 'komerca Esperanto', presu jaran Esperantan Katalogon de loke fabrikitaj produktoj, kaj por evoluigi Esperantan sekcion en siaj bibliotekoj. Faucheur ĝentile rifuzis.

Jen la 100-a Universala Kongreso de Esperanto okazis en Lillo. La publika programo inkludis tradician dancadon en la Plaĉas du Théâtre, ekumenan servon en la Eglise Saint-Maurice kaj koncertoj de Esperanto-kantistoj. Estis ankaŭ enkondukaj lecionoj pri Esperanto kaj internacia piedpilka matĉo inter Esperanta teamo kaj Okcidenta Saharo (mi prisilentas la rezulton, ne favore al E-istoj).



Mi iris vidi la kantisto JoMo (Jean-Marc Leclerq) ludi ĉe la Gare Saint-Sauveur, eksa bazaro je sud-orienta rando de la urbocentro. Leclerq, kiu originas de Tuluzo, plenumiss en Esperanto kaj en la okcitana. Unu lingvo estas internacia, la alia – loka kaj malnova, ☞

sed la kombinaĵo estas malpli mirinda, ol eble unue ŝajnas: la deziro eskapi la superregadon de anglosaksaj ĉefurboj povas konduki al ambaŭ regionismo kaj tutmondismo.

Lillo estis la Eŭropa ĉefurbo de kulturo en 2004. Metropolo Lillo, laŭ freŝa raporto, "vidas kulturan dinamismon kiel vektoro de socia harmonio por urba kaj ekonomia evoluo". La TGV super-rapida trajna linio de Parizo al Bruselo estis kompletigita en 1993. La Gare de Lille Europe malfermiĝis la sekvantjare. Areoj de laboristklaso, kiel Wazemmes kaj Moulins, estas renovigataj.

"Nia urbo jam ne plu estas industria," – Fernand Danchin, urba konsilanto, diris: "Nia maljuna Lillo devas memori la tempon, kiam oni ne povis iri dudek paŝojn en Lillo sen renkonti unu fabrikon: hodiaŭ industrio movas for la ĉirkaŭaj komunumoj kaj Lillo fariĝas urbo de literaturo, scienco kaj arto." Li diris tion en 1905.



Dum la fermo de la kongreso oni omaĝis al Osmo Buller, la aktuala Ĝenerala Direktoro de UEA, kiu emeritiĝos komence de la jaro 2016. Li dediĉis multajn dekjarojn por servi la tutmondan E-movadon kaj la CO-on de UEA (S-ro Osmo elposteniĝis en UEA en la jaro 1985!). Lige al tio, la prezidanto de UEA Mark Fettes anoncis la nomon de lia anstataŭonto (publike konigitan jam la antaŭan tagon, komence de la kunsido de la komitato de UEA), kiu estas Veronika Poór (mem ĉeestinta en la salono).

Sur la apuda foto vi povas vidi Osmon kun a 91-jara Marjorie Boulton, kiu estas unu el la plej elstaraj Esperanto-poetoj. La foto estis farita dum ŝia renkontiĝo kun legantoj, t.n. Aŭtora Duonhoro, en la 100-a UK en Lillo. Ni proponas al vi poemon de nia elstara poetino:

### *Finfine* de Marjorie Boulton

Altestimata, ĉu se mi unue
mortos, vi venos en la lasta horo
kaj min brakprenos, por ke mi malfrue
feliĉu milde apud via koro?

Ĉu vi permesos, kiam lasta spiro
forflugos, brule sekos mia haŭto,
ke mi vin kisu, ne plu pro deziro,
sed kiel lasta preĝo, lasta laŭdo?

Miraklo sur la kompatema brusto
povos okazi, tute senintence:
vi eble revivigos min kurace.

Se ne, vi povos diri dum la flustro,
kion vi faros poste, kondolence:
"Ŝi estas morta ... sed ŝi mortis pace…"

(*Originale aperis en La Nica Literatura Revuo*, ½)

Plue: la 1-an de aŭgusto 2015, dum ferma ceremonio de la UK, la kunordiganto de E@I kaj prezidanto de la LKK de la venonta 101-a UK en Nitro – Peter Baláž – post simbola transpreno de la kongresa flago sen antaŭa anonco publike sur la podio antaŭ ĉiuj kongresanoj svatiĝis al sia plurjara koramikino Dorota Rodzianko, kiu lian proponon akceptis. Gratulojn al la novbakita E-familio.

**("Sukcesega UK en Lillo" daŭrigota en la sekvanta numero!)**

## Loke – Mirakle

Antaŭ nelonge mi eksciis, ke 6-jara Davido-Armano nun NE estas la plej juna membro de nia E-societo: la 15an de Julio liaj gefratoj, Danĉjo (Meteoro) kaj Minjo (Stelo) anstataŭigis lin je la honora posteno de la plej juna societano de la Esperanto Societo de Ŝikago. Sincerajn gratulojn al la familio, sanon al ĉiuj familianoj! Nun, nia E-societo membraro kreskis je du membroj pli!

### Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Randy Ream
1835 N. Natoma Ave.
Chicago, IL 60707
773-262-7738
www.esperanto-chicago.org

### Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Randy Ream
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Karlo Gunn

### MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn
828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105

### KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Cobbler Square Loft Apts.
1350 N. Wells St., Chicago, IL
Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t.**

### SEKVANTAJ KUNSIDOJ

**28an de Aŭgusto** – Partoprenintoj raportas pri la 100-a UK. La nova adreso: 1350 N. Wells St. Bonvenon! Por senpaga parkejo bv telefoni al Viktoro laŭ la numero (773) 344-2276.. Vi rajtas preni vian ŝatatajn ne-E-amikojn, manĝaĵojn kaj trinkaĵojn (dolĉakvon, bieron, vinon ktp).

**22an de Septembro** – Vasil Stus kaj Nobel-premio (Araneo)

